

sub la suda kruco ★  
septembro 2014

# ESPERANTO



# ESPERANTO SUB LA SUDA KRUCO

OFICIALA ORGANO DE LA AŬSTRALIA KAJ NOV-ZELANDA ESPERANTO-ASOCIOJ

---

Volumo 22 [2] numero 116 septembro 2014

---

Presita de CMYK Colour Online en Melburno, Aŭstralio  
Redaktoroj: David Ryan, Joanne Johns  
Kontaktadreso | [esk2@esperanto.org.au](mailto:esk2@esperanto.org.au)

AEA - ESK  
G.P.O. Box 2122  
Melbourne, Victoria 3001  
Australia

---

## Abonoj & Pasintaj Numeroj

Esperanto Sub la Suda Krucio estas sendata al membroj de la Aŭstralia Esperanto-Asocio (AEA) kaj Nov-Zelanda Esperanto-Asocio (NZEa).

Por informoj pri abonoj, pasintaj numeroj, kaj pri membriĝo al la asocioj:

AEA | [www.esperanto.org.au](http://www.esperanto.org.au) – [info@esperanto.org.au](mailto:info@esperanto.org.au)  
NZEa | [www.esperanto.org.nz](http://www.esperanto.org.nz) – [exec@esperanto.org.nz](mailto:exec@esperanto.org.nz)

---

## Kiel kontribui al ESK

Sendu eseojn, ideojn, rakontojn, esprimojn de vidpunkto, leterojn, desegnaĵojn, fotojn, kaj iun ajn alian originalan kontribuon al nia kontaktadreso, [esk2@esperanto.org.au](mailto:esk2@esperanto.org.au)

Limdato por kontribuoj por la sekva numero

**15-a de januaro 2015**

---

La redaktoroj rajtas redakti, korekti, mallongigi kaj konformigi al la stilo kaj kutimo de ĉi tiu gazeto ĉiujn tekstojn antaŭ aperigo.

Por la opinioj aperantaj  
en ĉi eldonajo respondecas la aŭtoroj.  
Ili ne necese spegulas la opiniojn  
aŭ de AEA aŭ de NZEA.

---

Copyright © 2014 AEA & NZEA – ĉiuj rajtoj rezervitaj  
ISSN 1038-9380.

**SUR LA KOVRILO** La skulptaĵo *Reĝina Abelo* de Richard Stringer, en Melburno

**SUR LA MALANTAŬA KOVRILO** Vido de Melburno el la Sanktejo de Memoreco



**5.** Ĉu nova flago por Nov-Zelando?




**6.** Dufoja enŝipiĝo



**8.** Pensoj pri baldaŭa problemo



**11.** Esperanto-TV nun videblas




**13.** La naskiĝloko de vortoj




**14.** Lingva festivalo en la Universitato de Adelajdo




**16.** Miaj spertoj en Esperantujo /  
My experiences in Esperanto-land



**19.** Hazel Green – virino kiun oni  
ĉiam povas fidi



**22.** Tento!



**24.** Raportoj pri la 99-a Universala Kongreso en  
Bonaero

*septembro, du mil dekkvar*

Kelkaj el ni uzas ESK kiel propagandilon por nia lingvo kaj, pro tio, ESK estas multkolora, profesia eldonaĵo. Fakte, ni devas fari tion ĉar ESK vere estas bela, okulfrapa revuo. En la pasinteco ni ankaŭ parolis pri anglalingva enhavo por povi propagandi al ne-esperantistoj. Tial, en ĉi tiu numero ni enkondukas novan dulingvan rubrikon pri spertoj kun Esperanto, por montri ke Esperanto utilas, kaj en du lingvoj por ke samtempe komencantoj povu iom lerni.

En ĉi tiu numero mi skribos pri mia sperto por doni ideon pri la formato ktp. Ekde nun mi atendos similajn kontribuojn de vi, niaj legantoj. Fotoj ankaŭ estas bonvenaj. Bonvolu sendi vian kontribuon aŭ en Esperanto aŭ en angla aŭ en la du lingvoj. Se vi sendos en nur unu lingvo, ni faros tradukon al la alia lingvo. Multaj el vi jam faris simile. En sesio dum la kongreso en Adelajdo en 2011 multaj el vi parolis pri

via sperto, kialoj por lerni Esperanton, vojaĝado en Esperanto-lando ktp.

Ĝojigas min ke unu el niaj legantoj, Bob Felby, reagis al artikolo en la marta-junia numero pri manĝado de katoj kaj aliaj bestoj. Mi bonvenigas tian reagon kaj dialogon inter niaj legantoj. Se vi legas ion kio plaĉas aŭ ne plaĉas al vi, skribu respondon! Vi ankaŭ trovos en ĉi tiu numero novan artikolon verkitan de la Esperanto-Rondo de Wellington. Certe multaj el vi ĉeestas regulan kluban kunvenon, ĉu ne? Profitu tiun okazon por verki artikolon por nia revuo.

Finfine, mi volas mencii artikolon en ĉi tiu numero pri nova projekto, Esperanto-TV, pri kiu Richard Delamore multege laboras. Vi nun povas spekti televidon en Esperanto! Certe Zamenhof tre ĝojos ke Esperanto atingis tian mondiskalan sukceson.

Do, tio sufiĉas por mi. Ek nun al viaj komputiloj por verki pri via esperantista vivo!

Faru kafon kaj eklaboru!



# Ĉu nova flago por Nov-Zelando?

DE LA ESPERANTO-RONDO DE WELLINGTON

Frue en ĉi tiu jaro membroj de la brita reĝa familio vizitis Nov-Zelandon kaj Aŭstralion. Multaj homoj iris surstraten por entuziasme bonvenigi ilin. Ĉi tie en Nov-Zelando ni ĝenerale amas la reĝan familion. Tamen, kiel kutime, ekis debato pri la rolo de tiu eksterlanda reĝa familio en nia moderna Nov-Zelando. Eble iam en la estonteco la Reĝino ne plu estos nia oficiala nacia estro.

Antaŭnelonge oni ankaŭ parolis pri la nov-zelanda flago kiu, kiel la aŭstralia flago, havas en la supra maldekstra angulo ege britan simbolon, la flagon de la Brita Unio. Oni diras ke nun en la 21-a jarcento la brita imperio ne plu ekzistas kaj Nov-Zelando estas sendependa lando kaj, pro tio, nia flago ne plu devas porti tiun simbolon de la brita imperio. Alikiale, ĉiam ekzistas konfuzo pri la diferenco inter la nov-zelanda kaj aŭstralia flagoj. Ofte en kvizoj oni demandas kiom da steloj kaj de kiu koloro havas ĉiu flago.

Do, ĉu ni havu novan flagon?

**Jes**, principe ni devas havi nian propran flagon. La nuna flago kun tiu brita simbolo taŭgis antaŭ multaj jaroj sed nun ni estas nova lando. Nia flago tro similas al tiu de Aŭstralio. Estas multaj eblecoj por nova, moderna, bela flago malsimila al tiu de Aŭstralio. La flago povas havi simbolon de Nov-Zelando, ekzemple arĝentan filikon, kivion,

ŝafojn, maorian simbolon, aŭ nian mondfaman rugbean teamon. Tamen, nova flago devas esti simpla, simbola, kaj klara. Ni sugestas ke ĝi aludu al la suda kruco – stelo kun kvin pintoj. Nov-Zelando havas multajn arbarojn kaj grandajn kampojn. Tial, la fono devas esti verda. Niaj montoj havas neĝon kaj la akvo en niaj riveroj estas ĝenerale pura. Tial, kial ne suda kruco sur blanka fono kun granda verda fono? Ekzemple:



Ege bona ideo, ĉu ne?

Se ni havas novan flagon, kiu elektos ĝin? Ĉu niaj karaj politikistoj kapablas fari bonan decidon, aŭ ĉu per publika referendumo? Ĉu publika desegna konkurso? Certe ne ĉiuj estos kontentaj pri nova flago kaj la kosto de ŝanĝo estos ege alta. Tamen, nova flago estos bona por lokaj fabrikoj. Imagu ke ili devos dungi multajn homojn por fabrikilojn da flagoj.

**Ne**, ni ne devas havi novan flagon. La suda kruco estas taŭga simbolo por Nov-Zelando, kaj brita simbolo

en nia flago ankoraŭ validas ĉar ĝi estas parto de nia historio. Estas vera fakto ke ni ekzistas kiel Nov-Zelando dank'al britaj esploristoj (ni forgesu ke 'Zelando' estas nederlandlingva vorto kaj ke la unua eŭropano kiu malkovris Nov-Zelandon estis nederlandano). Ni parolas la britan anglan lingvon, ni ludas kriketon, plejmultaj nov-zelandanoj estas britdevenaj, kaj ĉiuj amas 'Coronation Street', ĉu ne?

Ni havas ege brilan ideon. Nia flago ne ŝanĝiĝos sed Aŭstralio

povas elspezi multan monon por havi novan flagon. Ne plu ekzistos konfuzo inter Nov-Zelando kaj Aŭstralio. La nova aŭstralia flago povas havi kanguruon, krokodilon, aŭ koalono, aŭ eble grandan foton de Dame Edna Everage. Tiam oni neniam forgesos la aspekton de la aŭstralia flago.

Aŭ eĉ pli brila ideo – nova kuna flago por Nov-Zelando kaj Aŭstralio ... kiam Aŭstralio iĝos la okcidenta insulo de Nov-Zelando.



Ĉu eksterlande – aŭ eĉ en niaj landoj – oni scias de kiu lando estas ĉiu flago?

## Dufoja enŝipiĝo

DE YVAN SERVE (NOV-KALÉDONIO)

Ĉi-foje mia rakonto ne temas pri la fama ŝipo 'La kapricemulino' kiun vi bone konas sed pri alia ŝipo iom pli granda per kiu mi ankaŭ navigis en Oceanio. Ĉar la ŝipo estis pli granda la maŝinestro havis helpanton, kutime junan inĝenieron kiu ĵus finis sian studadon kaj enŝipiĝis kiel kadeto nur unu jaron dum la nacia servo. Pro tio li kutime sciis nenion pri la mararmeo kaj ĝiaj ŝipanoj. Kaj tiam la maristoj estis malpli seriozaj ol nuntempe. Sed atendu plu!

Do iam venis la tempo anstataŭigi

la elirinton per nova helpanto. Ĉiuj el ni atendis la novan vic-maŝinestron.

La kadeto alflugis al Nov-Kaledonio kiam nia ŝipo jam malankriĝis por daŭra restado en la insularo de Tahiti. Tial, la estraro en Noumea reveturigis lin per aviadilo al la insulo Wallis kie la ŝipo haltis kaj ankrumis dum kelkaj tagoj. Tie okazis lia unua enŝipiĝo. Kutime, kiam iu oficiro enŝipiĝas li nepre devas viziti la ŝipestron, la vicŝipestron, kaj almenaŭ sian ĉefon. Krome li devas viziti la civilajn instancojn sed



Wallis-insulo en la Sud-Pacifiko

tion li jam faris en Nov-Kaledonio.

Post la laŭregulaj vizitoj, oni persvadis la kredeman kadeton ke ĉi tie en Wallis la episkopo estas elstara persono kiun li devas ankaŭ viziti. Cetere oni jam difinis rendevuon kun li baldaŭ, je la deka kaj duono, kaj la ŝalupo estis jam preta. Tiun viziton li devos fari kiel regula vizito vestita per la sama plej bela uniformo.

Nu, ĉar li devis baldaŭ ekveturi li atendis sur la ferdeko. Tamen, la ŝalupo malfruis. La kadeto malpacienciĝis. La deĵora suboficiro klarigis al li ke la ŝalupo estas malnova kaj la mekanisto provis malfacile starti la motoron. Finfine la ŝalupo albordiĝis al la flanka ŝtuparo. Kiel decas por veturigi oficiron la skipo konsistis el kvar ŝipanoj, la ĉefo kiu stiris, la mekanisto kaj du aliaj ŝipanoj kiuj starigis la hokstangojn, la unuan al la pruo, la duan sur la pobo. Kiam la kadeto fine sidiĝis la ŝalupo forveturis... kelkajn dekojn da metroj kaj la motoro stopiĝis. La mekanisto restartigis la motoron kiu post kelkaj dekoj da metroj denove haltis. La kadeto ne deziris ekkoleri la unuan tagon kaj diris kvietavoĉe 'Rapidu aŭ

mi maltrafos mian rendevuon'. 'Mi faru kiel eble plej rapide' respondis la mekanisto arogante. Prave la kadeto ne deziris ekkoleri, sed li longe rigardis la vizaĝon de la mekanisto kiun li certas revidi poste. Jen la motoro restartis multe pli rapide ol antaŭe. Post kelkaj minutoj ruĝa fumo ekblovis el la motoro. Ĝi certe odoris kiel fumnaskilo sed la kadeto ne kapablis tion flari. 'Fajro en la motoro' ekkriis la mekanisto 'Eblas ke la motoro eksplodos. Ĉiuj saltu al la maro!,' respondis la ĉefo kaj la kvar ŝipanoj tuj fornaĝis el la boato. La kadeto sekvis la movon. Tuj du komplezemaj ŝipanoj surmetis savbuon ĉirkaŭ lian torson. Tiel li ne povis naĝi. Tiel, la du maristoj pelis kaj tiris lin ĝis la ŝipo. Dumtempe la du aliaj maristoj reen grimpis sur la ŝalupon sed la duondronanta kadeto ne povis tion vidi.

Fine li enŝipiĝis je dua fojo sed nun el lia bela blanka uniformo disfluetis akvo. Antaŭ ol li enŝoviĝis en la koridoron, dum li trapaŝis la ferdekon, la deĵora suboficiro audis lin diri 'Kia aventuro, Dio mia, kia terura aventuro!'

Post kelkaj dekoj da minutoj, li eniris la manĝoĉambron de la oficiroj kun sekaj vestoj. Unue li ne komprenis kial ĉiuj ĉeestantoj ridadas, ĝis kiam li malkovris ke tie fronte al li staras la mekanisto kaj la tuta ŝipanaro de la ŝalupo, nun vestitaj de siaj oficiraj uniformoj. Eĉ la deĵora suboficiro ĉe la ŝtuparo tie staris. Nur tiam li komprenis ke li ĵus suferis petolaĵon.



# Pensoj pri baldaŭa problemo

DE BOB FELBY (ADELAJDO)

Mi ricevis la martan-junian numero de *Esperanto sub la Suda Kruco* la 8-an de junio 2014. Antaŭ ol daŭrigi mian artikolon, mi forte deziras esprimi miajn plej sincerajn dankojn al ĝiaj redaktoroj, Kam Lee kaj David Ryan. Neniu dubo pri tio, ili certe plenumas tre malfacilan taskon kun eĉ tre granda, eĉ grandega, sukceso!

Legante la artikolon "Kion ni manĝos en la estonteco?" mi komprenis ke ĝin verkis ne nur unu persono sed tuta aro da personoj, do, rondo da personoj, aŭ eĉ pli bone, rondo da novzelandaj gesamideanoj. Gratulojn ankaŭ al ili!

Ili bonkore sentis la problemon ke, pro la plimultiĝo de homoj sur nia ankoraŭ eĉ tre belega planedo ni iam estontece ne havos sufiĉe da manĝaĵoj. Tion eĉ mi povas kompreni. Sed mi komprenas ankaŭ ke ne nur al ni, tiel nomataj homoj, sed ankaŭ al niaj malgrandaj gefratoj, la tiel nomataj bestoj, birdoj, reptilioj, fiŝoj kaj insektoj, pardonu min se mi forgesis mencii viajn plej amatajn estuletojn kaj estulegojn, sed mi, feliĉe, ne estas sciencisto kaj tial mi ne scias la nomon de ĉiuj el nia kunkreitaro.

Ŝerceme la rondanoj proponis ke ni manĝu kelkajn el la superflujaj homoj sur la planedo. Sed mi konsilas ne fari tion. Tiuj superfluuloj estas

protektataj de sennombraj policistoj kaj armeanoj, kaj fakte estas ili kiuj manĝos nin, aŭ almenaŭ faras sian plej bonan por, per plialtigo de impostoj, ekstermi nin.

Nu, ĉar mi ne naivas, mi bone scias ke la rondanoj nur ŝercas. Sed ĉu ili ŝercas dirante ke iuj el ni iam manĝos abomenajn manĝaĵojn kiel katojn, kanguruojn, insektojn, hundojn, ĉevalojn, helikojn, balenojn kaj aliajn bestojn, kiujn ni fakte devus protekti?

Antaŭ multaj jaroj, fakte antaŭ 48 aŭ eble eĉ 50 jaroj, mi vegetaraniĝis. Tio signifas ke mi ne plu manĝas mortintajn korpojn kaj ke mia stomako ne plu estas la fina restadejo de miaj aliaj kunkreitoj!!! Komprenu tion, kiu el vi povas!!! Eble mi povas danki mian sanon al tiu mia decido antaŭ tiom da jaroj, sed mi konfesas ke de tempo al tempo eĉ mi mem ne certas pri tio!

Nu, bone, eĉ bonege. Ni ĉiuj situas sur malsamaj evoluostupoj, ĉu ne? Al iuj plaĉas igi siajn stomakojn tombejoj, al aliaj tio ne plaĉas. Mi mem manĝas bananojn, ĉar tiuj ne havas ostojn, kiel iam, antaŭ longe, kantis fama humoristo angla. Al mi ne plaĉas manĝi ostojn. Tial mi ne manĝas katojn, kanguruojn, hundojn, ĉevalojn aŭ balenojn. Kaj tiuj kunkreitoj certe ne plisanigus min. Ili kaŭzus ke mi suferus kanceron.

Malaltajn, laŭ evoluo, insektojn kaj helikojn mi neniam manĝas. Manĝante helikojn oni devas memori elsputi la ŝelojn, tial multaj verŝajne preferas manĝi nigrajn limakojn, sed mi certe ne! Mi ne scias pri tiuj kiuj manĝas la inteligentajn ĉevalojn, ĉu ili memoras elkraĉi la hufferojn, aŭ ĉu ili opinias ke ili bezonas pli da fero en sia sango?

Sed mi estas tia homo kia vere amas siajn kunkreitojn, bestojn kaj homojn. Mi neniel intencas kaŭzi al iu ajn timojn kaj dolorojn, kaj feliĉe tio neniel necesas. Estas ja ankoraŭ sufiĉe da manĝaĵo sur tiu ĉi nia belega planedo, sufiĉa por ni ĉiuj, sed ankoraŭ ne ĉiuj el ni ekkomprenas tion. Necesas ja bone elekti tion kion oni volas aŭ deziras manĝi.

Sed mi estas ja pensemulo, ĉu ne? Mi pensas ke sendube kelkajn jarojn post hodiaŭ la problemo estos eĉ multe pli granda. Tiam la viandmanĝantoj ne plu anoncos al la regantoj la forpason de siaj geavoj kaj aliaj familianoj. Kial ne? Ĉar mankos al ili manĝaĵo. Al la regantoj neniam mankos manĝaĵo. Sed, kaj mi iam scios, kion vi nun pensas? La postrestantoj de la geavoj manĝos siajn geavojn. Kion alian ili povos fari? La granda ordono ja estas: "Vi ne mortigu!". Sed, se oni ne manĝas, oni ja mortigas sin mem. Ĉu vi povas kompreni tion? Oni do ne rajtas mortigi sin. Sed por vivi oni devas ja manĝi. Kaj ĉar oni ne volas morale plialtigi sin al manĝado de fresaj legomoj kaj fruktoj, oni

simple manĝos siajn mortintojn. Kiuj kulpos? Kompreneble tiuj kiuj rifuzas kaj rifuzos manĝaĵon al la ordinara popolo. Tiuj kiuj konsideras sin mem pli altaj kaj multe pli gravaj ol ni la ordinara popolo. Neniu malbonaĵo okazos al ili dum ili vivas sur la planedo. Sed mi povas imagi kio okazos al ili post kiam ankaŭ ili forpasos kaj iliaj karnaj restaĵoj estos manĝataj!

Mi, kaj mi esperas ke ankaŭ vi, jam nun divenis kio okazos. Tiuj, kiuj konsideras sin multe pli kleraj ol ni, decidis ke nur alia milito povos solvi tiun problemon, eĉ problemegon. Kaj verŝajne tiel pensos ankaŭ la regantoj de aliaj nacioj. Do, jen alia milito. Aliaj milionoj da homoj perdos sian vivon. Ĝojos la regantoj, ĉar al ili okazis neniu malbonaĵo. Ili ĉiam venkas, ĉu ne? Kaj ĉu vi jam divenis kio okazos al la senspiritaj korpoj, kiuj kuŝas senvivaj sur la batalkampoj? Kompreneble la pluivantoj same kiel rabobestoj alkuras ilin kaj formanĝos ilin. Espereble ili memoros elkraĉi la medalojn. Tia estos la fino de la homaro, se ĝi ne kiom eble plej baldaŭ iĝos vegetarana.

Tio kion mi ĵus klarigis, kaj kion vi espereble tuj komprenas, ne estos la fino de la problemo. La problemo





daŭros kaj daŭros, jarojn post jaroj. Proksime al la fino de la homaro sur tiu ĉi planedo, kiu iam estis bela eĉ belega, okazos tio, ke pro la industriiĝo de niaj naturaj trezoroj, ni ne plu havos arbarojn ktp. Tiam la problemo vere problemos. "Kion ni faru, ni devas ja manĝi" diros la homaro kiu tiam jam voris la lastan insekton, vermon, helikon, limakon kaj nur Dio scias kiom da aliaj el liaj amataj kreitoj.

Nu, la sola solvo, laŭ la evoluanta cerbo de la homaro estas ja tute simpla. Tiam oni simple mortigos siajn proprajn bebojn kaj manĝos ilin. Kiam ne estos pli da beboj sur la tero, oni mortigos siajn pli aĝajn infanojn. Kiam ne estos pli da pli aĝaj infanoj sur la tero oni simple mortigos sian edzon aŭ edzinon. Tio dependos nur de kiu el ili sukcesos unue mortigi sian partner(in)on, ĉu ne? Mi povas, sed ĉu ankaŭ

vi povas, imagi tion, ke iam en la estonteco restos nur unu sola homo sur la planedo, kiu iam estis bela, eĉ belega? Restos nur unu homo, ĉio alia jam estos formanĝita. Restos neniuj arbo, neniuj plantoj, neniuj insektoj, neniuj mambesto, neniuj fiŝoj, neniuj limakoj ktp. Restos, kiel jam dirite, nur unu sola homo. Ne eblas scii ĉu viro aŭ virino. Sed kion manĝos tiu lasta homo sur la tero? Ĝi mangos sin mem, kompreneble. Ĝi devas ja manĝi. Estas peko mortigi, ĝi do ne povos ne manĝi, ĉar tio mortigus ĝin. Mi supozas ke ĝi komencos manĝi siajn piedojn. Espereble ĝi ne forgesos elkraĉi la ungojn de siaj piedfingroj kaj ankaŭ la ostojn de ili. Kaj tiel plu, kaj tiel plu, mi bedaŭras, sed nun mi ne kuraĝas daŭrigi mian artikolon, ĝi estas finita!!!

Kaj jen la postskribo: "Eĉ tre bonan apetiton al vi ĉiuj!!!

# Esperanto-TV nun videblas

DE RICHARD DELAMORE (SIDNEJO)

Esperanto-TV estas la sola IPTV-kanalo de la mondo en Esperanto. Ĝi debutis en aprilo 2014. La televid-kanalo estas elsendata per alt-rapida Interreto kun IPTV-teknologio. Ĝi estas disponebla tutmonde per ĉiuj iloj kiuj havas alt-rapidan Interretan konekton, t.e. Interret-ebligigitaj televidiloj, komputiloj, tabulaj komputiloj kaj (lertaj) poŝtelefonoj (Android kaj iOS). La enhavo de la kanalo estas plejparte en Esperanto, kaj konsistas el originalaj aŭ dublitaj unikaj kaj allogaj programoj, kaj ankaŭ zorge elektitaj filmetoj kreitaj de kontribuantoj ĉirkaŭ la mondo.

La ĉefa celo de Esperanto-TV estas liveri allogan enhavon al ĉiuj niveloj de parolantoj de Esperanto, de komencantoj ĝis denaskaj parolantoj. Kelkaj programoj estas ankaŭ en aliaj lingvoj, kiel ekzemple lingvaj kursoj por anglalingvanoj. Esperanto-TV estas rezulto de strategia plano de la Language Festival Association (Asocio de Lingvaj Festivaloj) kun bazo en Sidnejo.

Vi nun povas spekti Esperanto-TV ĉe [www.tikilive.com/show/esperantotv](http://www.tikilive.com/show/esperantotv). Vidu ankaŭ [www.esperantotv.net](http://www.esperantotv.net).

Jen intervjuo kun Roberto Poort, asociita produktoro de Esperanto-TV.

*Por komenci, ĉu vi povas iomete prezenti vin al niaj legantoj?*

Mi estas 61-jaraĝa nederlandano kiu jam dum pli ol 20 jaroj loĝas en Las Vegas, Nevado, Usono. Profesie mi jam dum multaj jaroj laboras kiel stevardo kun granda usona flugkompanio, do mi vojaĝis tra la tuta mondo. Kompreneble mia profesia posteno interese kongruas kun mia deziro esti mondcivitano. Nia familio, kiu entenas 5 gefilojn kaj jam 12 genepojn, estas multkultura kaj mult-rasa. Mia edzino, Telekaki, naskiĝis en la sudpacifika Tonga-Insularo, kaj niaj bogefiloj aldonis eĉ pli koloran miksaĵon al nia familio. Mi pli malpli mem-esperantiĝis antaŭ kvar jaroj per la lernolibro "Teach Yourself Esperanto" kaj ankaŭ mia loĝloko en la nevada dezerto substrekiĝas iomete da izoleco kiel esperantisto. Tamen, danke al la Interreto mi ne sentas min tute sola, ĉar ni nuntempe vivas en virtuala mondo, ĉu ne? Mi speciale interesiĝas pri radio



Roberto Poort

kaj televido en Esperanto.

*Kion vi opinias pri la ebleco krei veran televidon per Esperanto?*

Rilate al tiu temo, mi pensas ke ni evoluiĝis de la oftaj obskuraj YouTube-filmetoj ĝis la komenco de televida programaro en Esperanto. Kvankam YouTube (kaj aliaj similaj retejoj) kompreneble estas grandioza fenomeno, ni devas krei kulturen centron kie ni integrite prezentas

altkvalitajn filmmaterialojn, kaj teknike kaj enhave. YouTube pli kaj pli iĝas ĝangalo de kaj bonegaj kaj teruraj filmetoj, ofte kun malrespekto de kopirajtoj, kun ĝenaj reklamoj tra la ekrano, kie filmoj post la unua prezento izolece enarkiviĝas, almenaŭ ĝis kiam iu diligenta esperantisto mirakle povas denove trovi ilin. Esperanto bezonas sian propran televidan medion kun tutmonda senĉesa elsendo, kie oni ankaŭ povas facile trovi kaj rigardi unuopajn filmojn ĉiam kaj laŭplaĉe. ETV, Esperanto-TV, realigis tiun revon, danke al la plej lasta tekniko, kaj ankaŭ pro tio ke nuntempe ĉiu esperantisto kun moderna kamerao povas kontribui al nia komuna agado.

***Vi estas en la skipo de Esperanto-TV, sed vi mem jam havas vian propran retejon, Studio. Ĉu tio ne kaŭzas konfliktojn? Kiamaniere viaj antaŭaj spertoj influas en tiu kunlaborado?***

Studio estas radio-televido-portalo kie mi prezentas gamon de radi- kaj televid- iniciatoj, kaj ETV estas la plej lasta evoluo en tiu fako. Ĝi tute ne kaŭzas konflikton sed, male, montras ke nia komuna agado similas stafetkuradon kie ni ĉiuj kunlaboras por komuna celo. Parenteze, kiel redaktanto de Studio, mi ĉiutage spertas ke esperantistoj ne nur bezonas komunan lingvon sed ankaŭ, kiel ĉiuj homoj, bezonas pli bonan kunlaboron, dialogon kaj interkomprenon. Ni jam solvis la lingvan problemon kiu povas esti bazo por interkultura kaj interhoma aprezo. En nia epoko de rapidega evoluo ni nepre devas kompreni ke niaj iniciatoj rilataj al Esperanto simile rapidege ŝanĝiĝas. Por Studio, tio signifas ke

mi, kiel redaktanto, ekde la komenco jam sciis ke, post iom da tempo, naskiĝos pli bona iniciato kiu povos anstataŭigi la Studio-retejon... kaj mi bonvenas tian evoluon. Do, mia celo ekde la komenco estis kunlabori kun aliaj por ke ni komune povu krei eĉ pli bonan medion por radio kaj televido en Esperanto!

***Do, kio estas via tasko en Esperanto-TV?***

Nu, la ETV-teamo fakte ĵus komencis kunlabori en aprilo 2014. Tial, ni ankoraŭ serĉas la plej efikan manieron por kontribui. Mi nuntempe komunikas kun pluraj redaktoroj de retpaĝoj kaj kun multaj amatoraj kaj profesiaj filmistoj por kunmeti interesan, altkvalitan tv-programon. Ni celas inkludi ĉiujn kunlaboremajn esperantistojn, kaj tio signifas multegon da retpoŝtaj kontaktoj. Pli kaj pli da filmistoj jam mem kontaktas la ETV-teamon por prezenti siajn filmojn, kaj reprezentantoj de E-grupoj kaj institucioj pli kaj pli interesiĝas pri ETV. Kiel ETV-representanto mi tre impresiĝas pro la forta deziro kunlabori fare de tiom da samideanoj.

***Kion vi opinias pri la aliaj anoj de la skipo?***

Kiel ETV-teamo, en Sidnejo kaj aliaj mondpartoj, ni bonege kunlaboras, kaj ni ĉiuj havas niajn unikajn talentojn por kontribui al la televido en Esperanto. Se mi povus menci iun kunlaboranton speciale, ĝi estus nia produktoro, Richard Delamore, kiu tiel diligente kaj senĉese laboras por realigi nian komunan televidan projekton. Por gvidi iniciaton kiel ETV oni nepre bezonas eternan kuraĝon kaj paciencon, kaj li

jam montris ke li absolute ne rezignos ĝis ni atingos nian celon. Estas plezure kunlabori kun tiaj dediĉitaj kaj deciditaj kolegoj!

*Kiuj estas viaj esperoj por ETV?*

ETV espereble iĝos centro kie Esperantistoj televide konektiĝas, kie filmistoj prezentas iliajn verkojn, kie ni dubligas, subtekstigas kaj plibonigas filmojn. ETV jam prizorgas senĉesan tutmondan elsendon, kaj ni daŭre serĉas novajn lokojn por prezenti niajn programojn. La fejsbuk-grupo

“Esperanto” kun pli ol 14 000 membroj jam decidis permanente aldoni ETV-on kiel “fiksita afiŝo” al sia paĝo, ĉar ETV dinamike montras ke nia lingvo vivas! Oni nun simile povas aldoni la ETV-fenestron al iu retpaĝo aŭ blogo. Pli kaj pli da Esperanto-organizaĵoj subtenas kaj kunlaboras, ĉar ETV donas al ili la plej efikan manieron por disvastigi ilian mesaĝon. Tiel, ETV iĝos grandskala kunlaboro inter multaj esperantistoj por televide prezenti, ĝui, kaj kunhavi nian amatan lingvon.

# La naskiĝloko de vortoj

DE CHARLES STEVENSON (ADELAJDO)

Ĉu vi iam pensas ke, en ĉiuj lingvoj, ekzistas certaj travivaĵoj kiujn oni tute ne povas esprimi per vortoj?

Unu ekzemplo estas la sento de la akvo ĉirkaŭ la korpo, kiam oni plonĝas en la maron. Ne nur plezure malvarmeta, sed ankaŭ kontentiga al la mensa bonfarto. Alia ekzemplo estas kiam oni ne povas trovi vortojn por priskribi la sensacion, kiun aliulo donas per simpla mantuŝo, precipe se oni estas afliktita. Je la nesuperebla momento de la interkonatiĝo de viro kun virino tute mankas vortoj por esprimi la ekstazon.

Do, ni havas la poezion: ofte oni trovas tie la proksimumon de la travivaĵo. Ni havas ridadon, kaj ni havas ploron. Ĉiuj el ili esprimas pli ol iuj ajn vortoj. Ankaŭ kantado kaj muziko transdonas ion multe pli fortan ol vortoj.

En la arbaro, se oni kvietas, oni povas aŭskulti la arbaron. Mankas vortoj, sed troviĝas iu lingvo au

telepatio kiu sugestas danĝeron, belecon, ŝtormon, singardemon ktp.

Mi lernis ege rapide ke ekzistas okazoj kiam lingvo detruus la situacion. En la malliberejo por junuloj, kie mi laboris kiel universitata studento, du knaboj eskapis. Tion ili efektivigis tute senvorte.

En 1762 John Woolman, kvakero de Pensilvanio vizitis la Delavaraĵn indiĝenojn. Por ofendi neniun per sia prediko, li sugestis ke ĉiuj sidiĝu senvorte por pensi pri sia dio. Poste la indiĝena tribestro, Papunehang, diris “Mi ŝatas aŭskulti la naskiĝlokon de vortoj.”

Ne por mi la aĉa bruoj de televido aŭ radio. Kutime kontentigas min la propra pensado de mia menso, ĉar ie profunde kaŝita en ĉies menso troviĝas la naskiĝloko de vortoj.

# Lingva festivalo en la Universitato de Adelajdo

DE KATJA STEELE (ADELAJDO)

Dum la 16 kaj 17 de majo 2014 okazis lingva festivalo en la ĵus 140-jariĝinta Universitato de Adelajdo.

Ambaŭ fojojn, kiam Sandor Horvath organizis lingvan festivalon en sia Thebarton Seniors College (2012, 2013), la malferman parolon faris Ghilad Zuckermann. Ni konis tiun ĉi profesoron pri lingvistiko kaj endanĝerigitaj lingvoj de la tempo kiam ni preparis la jubilean kongreson de 2011 kaj la Esperanto-ekspozicion en la muzeo pri migrado. Jam de tiu tempo datiĝas nia plano ke iam okazu lingva festivalo en la universitato.

Estis Sandor, kiu tenis la fajron de la ideo vivanta kaj pasintjare Ghilad ja faris la decidon: en 2014 li mem organizos lingvan festivalon ĉe sia universitato. Kiam ni aŭdis

la unuan fojon ke tiu festivalo estu 2-taga evento kaj ke oni invitu la federalan ministron pri edukado, ni ĝojis kaj eĉ iom dubis. Tamen, Ghilad sukcesis, kaj meze de pasinta majo okazis la unua lingva festivalo de la Universitato de Adelajdo. La unuan tagon de la festivalo, vendrede, okazis la festa malfermo kun eminentaj parolantoj, unu el ili la ministro pri edukado Christopher Pyne. La granda salono Bonython estis plena. Inter la ĉeestantoj estis pluraj instruistoj el Thebarton, la lernejo de Sandor, kune kun liaj klasanoj. Sandor konvinkis ilin veni. Krome li prizorgis ke kelkaj siaj studentoj dancu aŭ kantu por la festivala publiko en ambaŭ tagoj.

La antaŭtagmeza sabata programo konsistis el pliaj interesaj prelegoj kaj tri duonhoraj prezentadoj de lokaj



Maldekstre: Ghilad kaj esperantistoj fine de la festivalo.

Meze: Indrani varbas surkoridore.

Dekstre: Sandor parolas pri la hungara.



Trevor prezentas Esperanton

profesoroj pri la ĉina, hispana, kaj kaurna lingvoj. Mallonga tagmeza paŭzo kaj tiam okazis samtempe 5 lingvoprezentadoj po 25 minutoj. Rapida moviĝo de unu klasĉambro al alia kaj pliaj 5 lingvoj... entute 25 prezentadoj, vigla, precipe juna aŭskultantaro, scivolemo en la aero. Sandor ankaŭ tiam engaĝiĝis prezentante la hungaran al multnombra publiko (Katja helpis dialogi hungare). Kompreneble, ankaŭ Esperanto estis montrita al la interesiĝantoj! Trevor prezentis ĝin al proksimume 20 scivolemuloj. Kelkaj rekte demandis lin pri kie akiri pliajn informojn. Tiam utilis la ŝlosiloj kaj la flugfolio kiun por

tiu ĉi okazo preparis – Sandor!

Surkoridore Katja kaj Indrani deĵoris ĉe tablo kun kelkaj Esperanto-libroj, Esperanto-ŝlosiloj, kaj flugfolioj. La homoj ja venis, demandis, forprenis la informmaterialojn, kelkaj lasis siajn adresojn.

Nia grupo estis la lasta kiu foriris. Estis bone vidi la lacan, sed ege kontentan Ghilad, kiu jam dum la kongreso ricevis multajn laŭdojn. Ni kune fotiĝis, gratulis lin kaj ĝojis ke la festivalo ne nur okazis, sed estis tiom sukcesa. Ni esperu ke venos multaj pliaj.

Jen unua dulingva artikolo pri niaj spertoj kiel esperantistoj. Ni serĉas volontulon por prezenti sin por la venonta numero de ESK.

Here is the first bi-lingual article about our experiences as Esperantists. We are searching for volunteers to present themselves for the next edition of ESK.

## Miaj spertoj en Esperantujo

DAVID RYAN (WELLINGTON)

Mi komencis lerni Esperanton kiam mi estis 14-jaraĝa. Ĉe la publika biblioteko de Christchurch mi serĉis franclingvan vortaron por mia hejmtasko kaj mi subite vidis libron pri Esperanto. Pro la fakto ke mi interesiĝis pri lingvoj kaj mi ne sciis kio estas Esperanto mi hejmenportis la libron kaj mi komencis lerni.

Estis malfacila tasko. La gramatiko estis facila sed mi devis lerni multajn novajn vortojn. Mi preskaŭ ĉesis studi.

Tamen, post kelkaj semajnoj, mi iris al mia unua kunveno ĉe la Esperanto-Klubo de Christchurch kaj tiam, kvar monatojn post kiam mi komencis lerni Esperanton, mi ĉeestis la nacian kongreson de la Nov-Zelanda Esperanto-Asocio kiu, tiun jaron, okazis en Christchurch.

Dum la fruaj tagoj de la kongreso mi komprenis preskaŭ nenion. Esperanto estis nekomprenebla. Subite, la trian de la kvin-taga kongreso, mi subite ekkomprenis.

Oni sugestis ke mi kontaktu la Korespondan Servon Mondskalan kaj mi akiris miajn unuajn plumamikojn

## My experiences in Esperanto-land

DAVID RYAN (WELLINGTON)

I started learning Esperanto when I was 14. At the public library in Christchurch I was looking for a French dictionary to do my homework, and I came across a book about Esperanto. I was interested in languages and didn't know anything about Esperanto, so I took the book home and started learning.

It was heavy-going. The grammar was easy but then I had to remember a whole lot of new vocabulary. I almost gave up.

However, after a few weeks I went to my first meeting of the Christchurch Esperanto Club and then, about four months after starting to learn Esperanto, I attended the New Zealand Esperanto Association national conference that happened to be in Christchurch in that year.

For the first few days of the conference I understood next to nothing. Esperanto was gibberish. Then suddenly on about Day 3 of the 5-day conference I finally got it.

I was then referred to the International Penfriend Centre and got my first penfriends in France and Spain (attractive girls about

en Francio kaj Hispanio (belaj junulinoj samaĝaj kiel mi – ĝoja aldona novaĵo). Poste mi havis plumamikojn en Grekio, Irano, Usono, kaj aliaj landoj. Memoru ke dum la 1980-aj jaroj oni skribis kartojn kaj surmetis poŝtmarkojn. Ĉiam feliĉigis min kiam, alveninte hejmen post la lernejo, mi trovis karton de unu el miaj plumamikoj.

Post kelkaj jaroj mi vojaĝis sola al Eŭropo kiam mi estis 18-jara kaj mi renkontis miajn plumamikojn en Hispanio kaj Francio. Fakte, Esperanto funkciis!

En 1989-1990 mi laboris kiel voluntulo dum tri monatoj ĉe la centra oficejo de la Universala Esperanto-Asocio en Roterdamo. Tie mi laboris kun esperantistoj el diversaj landoj kaj ĉiuj niaj konversacioj estis en Esperanto. Refoje, Esperanto funkciis. Dum tiu tempo mi ĉeestis junularan kongreson en Germanio kiun ĉeestis 600 homoj. Estis ege bone vidi tiom da junaj esperantistoj el diversaj landoj kaj, denove, Esperanto funkciis.

Tiam okazis la vera vivo kaj edziĝo.

the same age as me – that was a bonus!). I then got new penfriends in Greece, Iran, United States and other countries. Remember that in the 1980s these were the days when people wrote letters and licked stamps. It was always exciting for me to come home from school to find a letter from one of my penfriends.

A few years later I travelled alone through Europe when I was 18 and met up with my penfriends in Spain and France. Esperanto actually worked!

In 1989-90 I spent three months as a volunteer at the headquarters of the World Esperanto Association in Rotterdam. There I worked with Esperanto-speakers from various countries and all our conversations were in Esperanto. Again, Esperanto worked. During that time I attended a youth conference in Germany, attended by 600 people. It was amazing to see so many young Esperantists from a range of countries and, again, Esperanto worked.

Reality and marriage then popped up. I met my future wife (a non-



David Ryan (meze)  
trinkas bieron kun  
esperantistoj en  
Germanio

David Ryan (middle)  
drinks beers with  
Esperantists in  
Germany

Mi renkontis mian ontan edzinon (ne-Esperantiston) en Meksikio kaj poste revenis al Nov-Zelando kaj denove aktivis en la Esperanto-Rondo de Wellington kaj kiel estrarano de la Nov-Zelanda Esperanto-Asocio.

Dum la pasintaj 20 jaroj eksterlandaj esperantistoj restis ĉe ni de tempo al tempo kaj, kiam ni vojaĝas eksterlande, ni renkontas lokajn esperantistojn por kunmanĝi aŭ trinki en landoj kiel Brazilo, Nov-Kaledonio, kaj Germanio. Mi ĉiam memoras kiam ni alvenis al Bratislavo (ĉefurbo de Slovakio) en la trajno ekde Prago kaj tie grupo de esperantistoj atendis nin en la kajo de la stacidomo. Ili akompanis min kaj miajn familianojn por viziti la urbon kaj ni kune manĝis kaj babilis pri diversaj temoj. Tiu estis pli bona maniero por lerni pri Slovakio ol partopreni aŭtobusan ekskurson.

Sendube ne estas multaj milionoj da homoj kiuj parolas Esperanton. Tamen, mi ĉiam trovas ke Esperanto funkcias por tiuj kiuj parolas ĝin. Ni estas malgranda grupo, kaj tio plifortigas nian kuneston. Mi povas multmaniere uzi Esperanton. Mi povas paroli kun amiko en Meksikio per Skajpo, aĉeti elektronikan libron, ĉeesti kongreson, aŭ renkonti esperantistojn dum mia vojaĝado. Por mi, Esperanto certe pliriĉigas mian vivon kaj helpas min koni multajn diversajn kulturojn.

Esperantist) in Mexico, and returned to New Zealand, and became involved again in the Wellington Esperanto-Rondo and as an office-holder in the New Zealand Esperanto Association.

Over the last 20 years or so we've had Esperantists from overseas stay with us on a few occasions and we've been travelling overseas and have met up with Esperantists for a meal or a beer in places like Brazil, New Caledonia, Germany etc. I can always remember just three years ago arriving on the train from Prague to Bratislava (capital of Slovakia) and there was a group of Esperantists waiting for us on the platform. They took me and my family for a tour around the city and we ate together and talked about different things. That was a much better way to learn about Slovakia than to take part in a bus tour.

Obviously there are not many millions of people who speak Esperanto. However, I have always found that Esperanto works for those who speak it. We are a small community, and that strengthens the sense of togetherness. I can use Esperanto a lot, be it talking by Skype with a friend in Mexico, downloading an e-book, attending a conference, or meeting Esperantists on my travels. For me, Esperanto has definitely enriched my life and exposed me to many different cultures.

# Hazel Green – virino kiun oni ĉiam povas fidi

INTERVJUIS KATJA STEELE (ADELAJDO)

Kiam ŝi parolas, moviĝas tuta ŝia korpo: la kapo, la manoj, ĝentile la tuta trunko turniĝadas kaj iom eĉ la kruroj. Ŝia voĉo neniam estas forta, sed se necesas, ĝi ja estas firma. Verŝajne neniu aŭdis ŝin kvereli, disputi, sed sian opinion ŝi ne kaŝas. “Mi absolute scias ke tio kio estas vero por mi eble ne estas por la alia. “Aliaj vidpunktoj estas justaj ankaŭ”, ŝi diras kaj per nur kelkaj vortoj, sed Hazel esprimas kion ŝi konsideras vera, dirinda, ofte defende de iu alia. Oni ne vidas ŝin singravigi. Male. Eĉ se ŝi ne akceptas gravajn funkciojn, kie ŝi aperas tie ŝi helpas. Somerkursaroj, kongresoj – Hazel ĉiam estas “ĉemane” zorgante pri amaso da detaloj, sen kiuj pluraj aferoj ne povus funkcii.

*Nun vi loĝas en Oakey, negranda kvinslanda urbeto. Ĉu vi devenas el Kvinslando?*

Jes, mi estas denaska toowoombanino. Sed kiam mi estis 2-jara, nia familio translokiĝis al Brisbano, kaj inter miaj 7-a ĝis 10-a jaroj, ni vivis en Fiĝio. Ni iris tien pro la profesio de mia patro: li okupiĝis pri la patologio de agrikulturaj plantoj. Mia patrino estis antaŭ sia edziniĝo sekretariino. La profesio de mia patro kondukis nin por mallonga tempo ree al Brisbano kaj poste al Stanthorpe, ankaŭ en Kvinslando.

*Laŭprofesie vi estas bestkuracisto, ĉu?*

Mi ĉiam ŝatis bestojn, kaj interesis min anatomio, fiziologio, scienco. La

decido estis do studi en la Universitato de Kvinslando en Brisbano kie studis ankaŭ mia nuna edzo Paul, sed tiam ni ankoraŭ ne konis unu la alian. Mi diplomiĝis en 1968 kaj trovis laboron en best-kuracejo en Oakey kie laboris ankaŭ Paul.

Tre grava sperto estis por mi mia restado en Dunedin, Nov-Zelando. Mi laboris tie dum unu jaro kaj krom la devoj mi ankaŭ multe vojaĝis kaj multon vidis. Ankaŭ Paul venis tien por konferenco. Ni geedziĝis en 1972.

*Ĉu vi daŭrigis vian bestkuracistan laboron?*

Mi laboris nur parttempe – en la sama loko kiel antaŭe: Oakey. Kiam naskiĝis niaj infanoj (2 knabinoj kaj unu knabo), mi decidis resti hejme. Tamen, iom post iom mi ekvolontulis en diversaj organizoj, sed neniam plu kiel plentempa bestkuracisto.



Hazel kaj edzo, Paul, dum ILEI-konferenco en Kubo



**Maldekstre:** Hazel tenanta hundidon, kiun ŝi ricevis kiel kristnaskan donacon.

**Meze:** Hazel kun serpento. Ĉio estas en ordo kun la amika ludema serpento, ĉu ne?

**Dekstre:** Hazel kiel knabino en Fiĝio, elegante ludas pianon.

### ***Dum Esperanto-aranĝoj mi rimarkis ke vi ŝatas - kaj kapablas - bele kanti.***

Mi ĉiam ege ŝatis muziki. Kun miaj infanoj hejme ni ofte kantis kaj ludis plurajn muzik-instrumentojn. Kunkanti Kristnaske iĝis familia tradicio. En la lastaj jaroj mi kantas ankaŭ en du lokaj ĥoroj. Ne konstante, sed de tempo al tempo.

### ***Dum viaj esperantumadoj vi volonte marŝas. Via ĉiam svelta korpo perfidas ke vi estas turistema, sportema.***

Mi ŝatas naĝi, bicikli, marŝi, promeni. Iam mi marŝis eĉ tra dezerto. La pezaĵojn tiam portis kameloj. En Kvinslando kaj Solomon-insuloj mi ĝuis naĝadon kun spirtubo – ankaŭ

subakvan. Dum miaj pluraj vizitoj al Nov-Zelando mi ne tre volonte skiadis. Post kiam miaj ambaŭ genuoj vundiĝis, tio ĉesis.

### ***Kiam venis en vian vivon Esperanto?***

En 1987 la Toowoomba E-Societo metis en la lokan ĵurnalon alineon pri la jubilea jaro. Mi pensis: “Bone, ke Esperanto daŭras”, kaj pluvivis miajn kutimajn tagojn. Tiam mi estis sekretario de la Toowoomba filio de la kampanjo kontraŭ nuklea energio kaj do ricevis la progreseman ĵurnalon “New Leaves” (Novaj folioj) (redaktis kaj eldonis ĝin Trevor Steele). En ĝi mi trovis artikolon pri Esperanto kun gramatikaj klarigoj kaj ekzercoj. Mi ĝojis ĉar mi tute facile povis fari la ekzercojn. La ĵurnalo donis ankaŭ la adreson de John Moore, kiu prizorgis la korespondajn kursojn, sed mi daŭre prokrastis kontakti lin. Fine nur post unu-du jaroj mi venis al la loka Esperanto-societo kaj renkontis vivantajn esperantistojn – kaj eĉ kapablis paroli kun ili. Esperanto-kantado, seminario, prezentado en la Universitato de Suda Kvinslando, kaj



Hazel kun junaj gefiloj

Somerlernejo de 1996 en Adelajdo – post tio mi iĝis vere entuziasma esperantisto.

***De tiam vi jam partoprenis multajn somerlernejojn, eĉ universalajn kongresojn.***

La unua estis por mi la Adelajda UK (1997). Al la Berlina (1999) mi iris kun mia edzo Paul, kiu pro tio sufiĉe intense lernis la lingvon. Ni partoprenis la antaŭkongresan busan ekskurson al Pollando. Ĉie kie ni haltis, bonvenigis nin polaj esperantistoj, dancado, kantado. Plej elstaras en mia memoro la UK en Havano. Siatempe mi admiris Kep Enderby kiam li parolis pri sia UK en Kubo (en 1990) kaj en 2010 mi mem povis partopreni la tiean kongreson. La kubanoj estis aparte amindaj. Ili bonege prizorgis nin kaj dum la UK kaj dum la tiea ILEI-konferenco.

***Vi menciis la konferencon de ILEI (Internacia Ligo de E-Instruistoj). De kiam vi okupiĝas pri E-instruado?***

Estis Kep Enderby kiu dum la somerlernejo de 1996 insistis ke mi transprenu la korespondajn kursojn. Tiu tasko estis komence granda laboro, sed nun malmultaj aĉetas la kursojn.

Krome dum tri jaroj mi instruis po duonhoro semajne en elementa lernejo en proksima urbeto Kingsthorpe utiligante la Mazi-filmon kaj uzante miajn sciojn pri la rekta metodo de instruado (mi faris la A kaj B-seminariojn pri Cseh-metodo en 2003-2005). Fakte mi daŭre lernas, nun mi rete studas la RITE-programon (Reta Instruista Trejnado ĉe Edukado.net) kun Katalin Kovats. Mia lasta instru-sperto estis en la Universitato de Kvinslando. Dianne Lukes aranĝis Esperanto-prezentadon/instruadon dum la malferma tago de la tiea centro pri modernaj lingvoj kaj mi kaj Crystal Hill dum du horoj klopodis interesigi la alvenintojn.

***Evidente Esperanto havas grandan rolon en via vivo. Ĉu vi kredas je fina venko?***

Esperanto donis al mi la mondon. Mi tre ŝatus ke ĝi estu la internacia lingvo, sed mi ne atendas la finan venkon. Tamen, ni havu kuraĝajn planojn, eble ni atingos se ne la finan, almenaŭ grandan venkon.



Dum la kvindekjara epoko



Hazel energie kuras

# Tento!

DE JENNIFER BISHOP (MELBURNO)

---

Sidanta ofte antaŭ komputilo, iomete enua pro longa tempo ĉe la forstrekbuto, ĉu ne revivigas vin respondi al apuda telefono? Min ja, kvankam necesas plejofte nei eksterlandan oferton je nova asekurkontrakto, jam akiritaj sunpaneloj, nova energikontrakto ktp. Tamen, iun fojon, pro antaŭa rekomendo de kolegino de mia edzo kaj sekve lia entuziasmo je provo, kaj pro oferto ricevi du por la kosto de unu, mi konsentis aŭskulti la planon de fama ferikompanio. Tiel, malgraŭ la posta skeptiko de mia edzo, ni akceptis mallongan krozon al Pacifikaj Insuloj inkluzive de Nov-Kaledonio kiu aparte interesas nin pro ebleco viziti esperantistojn en Noumea. Tamen, mi ne tute bone komprenis la kontrakton ĝis mi ricevis la fakturon de antaŭpago. Tiam mi konsciigis pri la signifo de du por la kosto de unu – temas pri du krozoj, ne du personoj!

Do, indos unue akcepti vojaĝi al Nov-Kaledonio antaŭ ol mendi la duan krozon. Tiel mi tuj sendis mesaĝon al s-ro Yvan Serve kiu ofte prenas parton en kongresoj kaj somerkursaroj de AEA. Li tuj respondis entuziasme ofertante al ni ekskurson tra Noumea kaj renkontiĝon ĉe sia domo kun la Esperanto-grupo. Ĝoje akceptintaj lian afablan inviton ni atendis plurajn monatojn ĝis la dato de nia vojaĝo, fine de majo 2014, el Sidnejo.

Avide rigardante la veterproгноzojn kaj sekvan te la rekomendon de la ferikompanio! Ni pakis tre diversajn vestaĵojn kaj ne forgesis bankostumojn.

Oni permesis po du valizojn kaj mansakon por la tuta vestaro, sed bonŝance ni devis limigi nian vestaron pro antaŭa flugo el Melburno al Sidnejo. Ekde nia alveno ĉe la flughaveno en Sidnejo ni tute ne suferis zorgon pri niaj valizoj. Ni estas renkontitaj de ĉarmaj helpantoj vestitaj en ruĝa ĉemizo kiuj gvidis nin al la aŭtobuso por veturi rekte al nia grandega ŝipo. Kompreneble laŭ longa vico de ĉiaj familiaj grupoj necesis atendadi por enŝipiĝi, sed survoje la dungantoj estis tre afablaj, kaj profesia fotisto atendis nin survoje por fari foton antaŭ bildo de la ŝipo mem. Ni portis nur mansakon kun tranoktaj bezonaĵoj ĉar la valizoj liveratos eble ne ĝis morgaŭ matene. Ĉe la enirejo 'Klientoservoj' estas indikitaj kie ni ricevos ŝlosilon, mapon de la ŝipo kaj gvidadon de dunganto al nia ĉambro en la 7<sup>a</sup> etaĝo. Ĝi estis tre komforta ĉambro kun duŝejo kaj necesejo, fridujo plena je diversaj trink-/drinkaĵoj, televidilo kaj eĉ persona balkono ĉe la tribordo. Ni tuj grimpis la imponan ŝtuparon al la 9<sup>a</sup> etaĝo por promeni sur la ferdeko kontraŭ la Operdomo. Estis posttagmeze, tre bone por fari fotojn.

Jen la komenco de tre agrablaj 10 tagoj enŝipe. Ni povis elekti el pluraj manĝejoj, (nutraĵoj inkluzivitaj en la prezo), bela restoracio 'nouvelle', drinkejoj, vetejo, muzikejoj, kartoludejo, granda teatro, biblioteko kun komputilaro, moda aĉetvojo, du naĝejoj, unu kun ludejo, gimnastikejo kaj terapikliniko, promenejo ĉirkaŭ la tuta ŝipo kaj trankvila sidejo sen infanoj. Nur ĝis



Jennifer kaj Alan Bishop (kun floroj ĉirkaŭ la kolo) kun esperantistoj en Nov-Kaledonio

la dua tago ni malkovris ke partoprenas 2500 homoj inkluzive de 400 infanoj. Tamen, ni apenaŭ rimarkis la nombrojn nek la infanojn pro la grandeco kaj varieco de la kunvenejoj kaj la plena programo.

Post vizitoj al aliaj insuloj, frumatene malrapide sed kun tre bela vidaĵo de la marbordo la ŝipo navigiĝis en la aktivan havenon de Noumea. Ĝi estas aktiva pro la ĉefa industrio de la insulo, nome nikelo. Troviĝas multaj minejoj kaj de la haveno la nikelerco transportatas ĉirkaŭ la mondo. Ĝojigis nin multe renkonti Lena Leroy kaj Yvan Serve ĉe la apuda kafejo. Ni tuj komencis interesan veturadon supren por rigardi ĉiudirekten de la kompasoj. Ni povis bone rigardi la montaron ĉirkaŭan kaj la grandan okupatan havenon kun nikelminejo malantaŭe. Poste ni veturis al kanonenmetejoj restanta post la dua mondmilito. La insulo ne suferis invadon sed, same kiel aliaj ĉirkaŭaj

insuloj ĝi estas uzita kiel deponejo por la usona mararmeo.

La Esperanto-grupo de Noumea atendis pacience nian alvenon kaj samtempe estas liveritaj pletoj kun tre beletaj bongustaĵoj sukraj kaj malsukraj. Ni dume interkonatiĝis kaj admiris la ĉarman domon kaj ĝardenon de s-ro Serve. Sidante, mia edzo, Alan, kaj mi, ĉiu ĉe alia tablo, ni babilis, ridis, interdiskutis kaj ĝuis interkomprenadon per nia kara lingvo, Esperanto. Bedaŭrinde nur s-ro Serve planas eble viziti AEA-kongreson venontan januaron en Melburno. Pasis la tempo tre rapide ĝis necesis fini la tre specialan viziton por trafi la ŝipon je la 16.00, sed ne antaŭ, kun helpo de s-ino Leroy kaj s-ro Serve, aĉeti diskon de populara indiĝena muziko. Dum la vojaĝo ree al Sidnejo, ni ĝuis konsideri la tutan krosadvojaĝon decidintaj ke la vizito al esperantistoj en Noumea estas por ni la plej signifaj kaj ĝojigaj eventoj.

# Raportoj pri la 99-a Universala Kongreso en Bonaero

Jen ni prezentas du raportojn pri la Universala Kongreso de la Universala Esperanto-Asocio kiu okazis ĉi-jare en Bonaero, ĉefurbo de Argentino.

DE HAZEL GREEN (OAKKEY)

Argentino estis gastlando de la antaŭjubilea Universala Kongreso de Esperanto en julio/aŭgusto 2014, kaj 7 aŭstralianoj ĉeestis. Kvankam iom malgranda, ĝi estis tre sukcesa, ĝuebla, kaj fruktodona kongreso, kaj multaj amerikanoj havis nekutiman ŝancon ĉeesti internacian kongreson. Ŝajnis ke ĉie en la kongresejo kaj apudaj stratoj de Bonaero estis ridetantaj brazilanoj.

La kongresa temo “Ĉu la nepoj nin benos? Streboj al daŭripova estonteco” instigis interesajn diskutojn, kaj fina kongresa rezolucio emfazis interkulturan edukadon, homajn rajtojn, naturprotektadon, popolan klerigadon, ŝparon de rimedoj. En

la kongresa universitato ni lernis pri multaj temoj, de nanoteknologio ĝis mezuro de lingva justeco.

Dum la unua vespero okazis movada foiro. Tie ni povis vidi la laboron de diversaj esperantaj grupoj kaj landaj asocioj, kaj multe babili. La melburnanoj, Heather kaj Esther, disdonis informon pri la venonta kongreso de AEA/NZEA. La aliaj kutimaj arigoj de preskaŭ ĉiu kongreso okazis kaj donis multe da plezuro: la solena malfermo, nacia vespero, internacia vespero, solena fermo.

Dum la nacia vespero, ni vidis tradiciajn kamparajn dancojn de Argentino, kaj poste aŭdis muzikon

Parto de la fama akvofalarego Iguazu vidita dum antaŭkongreso



kaj vidis dancadon de la fama tango de Bonaero. Dum la semajno estis pluraj ŝancoj vidi la tangon kaj eĉ okazis lecionoj en Esperanto, sed NE petu ke Paul kaj Hazel montru ĝin! Ĉiu ero de la internacia vespero estis tre ĝuebla, aparte kantado de “Ne ploru por mi Argentino”, kaj vizito de Charlie Chaplin. Alan Bishop gvidis la internacian ĥoruson kaj, kiel kutime, li elektis kanton de la gastlando.



Tradicia argentina danco

Tute nova ero de la kongreso estis historia futbalmatĉo. Mi citas de la fesbukpaĝo de la UK: “Neforgeseblaj momentoj de la unua oficiala futbala matĉo de Esperanto en la NF-Board. Malgraŭ la vetero, la apogantoj varmigis la etoson, same kiel niaj ludintoj. Okazis oficiala malferma ceremonio kun ĉeesto de la Prezidanto de UEA, Mark Fettes, la prezidanto de la Argentina Esperanto-Ligo, Jorge Cabrera, kaj aŭtoritatoj de la argentin-armena komunumo, oni kantis la argentinan, armenan kaj esperantan himnojn kaj finfine oni ricevis atestilon kiu rajtigas Esperanton partopreni en ĉiuj oficialaj matĉoj kaj Mondpokalo de la NF-Board. Estis ankaŭ ekskursoj, koncertoj, kunkantado, lecionoj. Entuziasmaj esperantistoj el Lillo, Francujo, estis tie por inviti ĉiujn



Alan kaj Jennifer Bishop manĝas argentinan tagmanĝon dum kongresa ekskurso



Gratulon al niaj ludintoj!! Jen fotoj de la teamoj, kaj de la spektantoj kiam ili laŭte akklamis la unuan esperantan golon. Fina rezulto estis 3 goloj por la Esperanta teamo, 8 goloj por la argentin-armenanoj, kaj amikeca etoso por ĉiuj.

veni al la 100a kongreso en tiu urbo en 2015. Kaj la Prezidanto de UEA

Mark Fettes anoncis ke la UK en 2016 okazos en Slovakujo.

## DE HEATHER HELDZINGEN (MELBURNO)

Kiel kutime, la Universala Kongreso en 2014 havis tre bonan etoson ekde la inaŭguro ĝis la solena fermo. Ĝi komenciĝis en malvarma vetero sed la varmeco de la partoprenantoj varmigis nin. La temo de la kongreso estis "Ĉu la nepoj nin benos? Streboj al daŭripova estonteco." En la vortoj de la reĝistoro de la kongresa temo, Rafael Henrique Zerbetto: "Daŭripoveco estas la plej grava nuntempa defio: ni malŝparas la rimedojn ekzistantajn sur nia planedo en freneza konsumado, dum plejmulto de la tutmonda loĝantaro vivas en mizero. Ekonomikistoj konsideras ke ekonomio povas senfine kreski sur limigita planedo kun limigita nombro da rimedoj kaj bezonoj. Tiu situacio nin kondukas al estingiĝo, kaj ni devas saĝe uzi la disponeblajn rimedojn, por ke ili ne manku al la ontaj generacioj. Minaco al la estonteco de la homaro estas problemo de ni ĉiuj, kaj esperantistoj ne povas silenti!"

La kongresejo estis granda hotelo en la centro de Bonaero en strato 140

metrojn larĝa! Aŭtobusejo kaj metrostacidomo situis apud la hotelo kaj ankaŭ proksimis al restoracioj kaj butikoj. Bonaero estas granda urbo kun pli ol 14 milionoj da enloĝantoj. La konstruaĵoj varias de malnova hispana aŭ franca stilo al moderna.

Ĉiutage estis multaj elektelecoj por partoprenantoj kaj ofte estis problemo decidi kion oni ĉeestos. Dum la Kleriga Lundo mi iris al la salono kie Hori Yasuo prelegis pri japana kaligrafio. Unue li prezentis la ortografion de la japana lingvo, kaj poste kaligrifiis frazojn sur granda papero kaj donis unu al mi! (vidu la foton). Tage okazis prelego pri



Heather ricevas kaligrifiajn frazojn de Hori Yasuo el Japanio

Argentino kaj lecionoj de tango!

La Nacia Vespero komenciĝis kun iom da problemoj ĉar la pordoj de la kunvenejo estis ŝlositaj kaj ni devis stari en la malvarmeco dum pli ol 30 minutoj. Tamen, la vespero pliboniĝis kaj ni multe ĝuis, inter aliaj, la dancojn kaj muzikon.

Mi vidis ĉarman filmon pri la vivo de Tibor Sekelj faritan de serba televido. La ĵurnalistoj sekvis liajn paŝojn tra diversaj landoj kiujn li vizitis. Tiu filmo estis tre interesa al mi ĉar mi kaj mia edzo, Ivan, gastigis Tibor kiam li vizitis Melburnon antaŭ pli ol 40 jaroj.

Por la unua fojo la LKK organizis futbalmatĉon kun Esperantistoj kontraŭ loka teamo. Malgraŭ la fakto ke la loka teamo venkis, la esperantistoj ankaŭ venkis ĉar 2 artikoloj, inkluzive foto, aperis en lokaj ĵurnaloj. Tial, amaso da lokaj homoj nun scias pli pri la internacia lingvo! UEA nun planas kapti okazojn por ludi aliajn matĉojn ĉiujare.

La Internacia Arta Vespero distris nin, inter alia, per dancoj kun vualoj, apero de "Charlie Chaplin", la Internacia Ĥoruso kaj, je la fino, la entuziasma kaj furora korea "Gangnam Style"-dancado. Dum la vespero argentina kantisto kun granda emocio bele kantis "Ne ploru por mi Argentino", la plej konatan kanzonon el la muzika teatraĵo "Evita" el 1978. Kantata de "Eva Peron", ĝi iĝis preskaŭ himno de Argentino.

Kiel ĉiam ni havis la ŝancon renkonti malnovajn amikojn kaj fari



Konstruaĵoj de diversaj stiloj en Bonaero

Ne ploru por mi, Argentino  
 Ne ploru pri mi, Argentino  
 Ne malfacilas kompreni ke,  
 Malgraŭ ke mi estas nun ĉe la pov',  
 De l' popolo venas mi, do ne forgesos vin...  
 Mi petas, kredis ke la luksoj nur estas ŝajniĝ',  
 Nenio ol burĝa ludet' – reguloj de l' ceremoniar'...  
 Mi devis submetiĝi kaj poste ŝanĝi...  
 Kaj ne plu vivi sen revo ĉe l' kor',  
 Ĉiam nur malantaŭe de fenestr' aŭ pordeg'...  
 Libera esti – mi provis, sed sen rezigni pri l'rev'  
 Ke mi meritos la amon, kiun vi ĉiuj sentas por mi...

Ne ploru pri mi, Argentino...  
 Anime ĉe vi, mi estas...  
 Al vi mi donas la tutan vivon...  
 Sed min ne lasu... Ĉe mi ja restu...  
 Neniam pri la povo aspiris mi...  
 Ja oni mensogis pri mi...  
 Venis mi de l' popolo, kiun ja amas mi...  
 Mi volas senti min tre proksime de via kor',  
 Batanta por mi kun fervor'...  
 Kaj tion ne forgesos mi...

Ne ploru pri mi, Argentino...  
 Mia animo estas kun vi...  
 Mian tutan vivon mi al vi dediĉas...  
 Sed ne forestu...  
 Mi vin bezonas...  
 Mi parolis tro, sed ja nur por vin konvinki  
 Pri la tuta ver'...  
 Sed se ankoraŭ dubos vi,  
 Sufiĉos rigardi enen de mi...



Emma Brueninger, Sandor Monostori,  
 Heather Herldzingen, Didier Izacard

novajn amikojn. Tio estas la plej plezurplena parto de ĉiu kongreso. Same kiel en Rejkjaviko, dum la Solena Fermo, Mark Fettes spontane paroladis pri la estontenco de la Esperanto-movado. Li sukcesis vekti la entuziasmon kaj reagemon de la kongresanoj kaj instigis nin ĉiujn preni parton en la 100a kongreso en 2015 en Lille, Francujo. Do, ĝis tiam!



Tango kaj tradicia argentina danco



La prezidanta palaco

# Financa Raporto de AEA por 2013/14

HEATHER HELDZINGEN (MELBURNO)

Ĉiuj detaloj estos haveblaj dum la jarkunveno en Melbourne en januaro 2015.

## Australian Esperanto Association

C/- G.P.O. Box 2122

Melbourne 3001

### Profit & Loss Statement

1/07/2013 through 30/06/2014

30/09/2014

2:18:14 PM

#### Income

|                                |             |
|--------------------------------|-------------|
| Membership Subscriptions       | \$3,672.50  |
| Congress 2014                  | \$30,690.01 |
| Book sales                     | \$32.00     |
| ESK Reimburse. from NZ         | \$655.55    |
| Bank Interest Received         | \$21.56     |
| Donations                      | \$5.00      |
| Fondusdo a/cs interest         | \$5,081.94  |
| Internat. Travel Fund Interest | \$2,700.50  |
| Correspondence course          |             |
| Sale of Courses                | \$120.00    |
| Interest on account            | \$0.64      |
| Term Dep. Int. -Correspondence | \$311.52    |
| Book sales                     | \$222.44    |

Total Correspondence course \$654.60

Total Income \$43,513.66

#### Cost of Sales

#### Gross Profit

\$43,513.66

#### Expenses

|                                |             |
|--------------------------------|-------------|
| Bank fees                      | \$45.20     |
| Congress/Summerschool expenses | \$36,300.26 |
| 2015 Congress/Summerschool     | \$5,000.00  |
| Depreciation/ Write-down Exp   | \$3,624.33  |
| Dues & Subscriptions           | \$45.49     |
| Computer & internet expenses   | \$1,172.00  |
| Bad debt -Mondeto - T3W3       | \$8,000.00  |
| Legal Fees                     | \$32.10     |
| ASIC Fees                      | \$451.00    |
| ESK Printing                   | \$2,042.00  |
| Postage                        | \$1,130.11  |
| Library & Archives expenses    | \$868.00    |
| Printing & Stationery          | \$220.68    |

Total Expenses \$58,931.17

#### Net Profit / (Loss)

-\$15,417.51

# Australian Esperanto Association

C/- G.P.O. Box 2122

Melbourne 3001

## Balance Sheet

As of June 2014

30/09/2014

2:20:24 PM

### Assets

#### Current Assets

##### Cash On Hand

|                               |          |
|-------------------------------|----------|
| CBA Operating A/c 00903636    | \$24.20  |
| CBA Summerschool/congress A/c | \$179.59 |
| Petty Cash                    | \$100.00 |

Total Cash On Hand \$303.79

##### Fondusoj

|                           |             |
|---------------------------|-------------|
| Capital A/c 00946975      | \$42.96     |
| CBA Term Deposit 50170900 | \$51,423.66 |
| CBA Term Deposit 50186697 | \$61,249.70 |
| Int. Travel Fund 50143134 | \$54,633.28 |

Total Fondusoj \$167,349.60

##### PAYPAL

\$188.13

UEA Account Code AEAA-Z \$404.20

UEA Account Code AEL-W \$2,430.02

Correspondence Course

Correspondence Bank A/c 918439 \$2,046.30

CBA Term Deposit 444650058017 \$10,000.00

Correspondence Course Books \$2,166.84

Total Current Assets \$184,888.88

#### Other Assets

Accounts Receivable \$798.09

Loan \$100.00

Book Inventory

Libroservo \$6,051.60

AEA Library \$7,145.28

Total Book Inventory \$13,196.88

Total Other Assets \$14,094.97

#### Property & Equipment

Equipment

Equipment at Cost \$2,418.05

Total Equipment \$2,418.05

Total Property & Equipment \$2,418.05

Total Assets \$201,401.90

### Liabilities

#### Current Liabilities

Loan \$2,000.00

Membership Subs in Advance \$250.00

Total Current Liabilities \$2,250.00

Total Liabilities \$2,250.00

Net Assets \$199,151.90

### Equity

Fondusoj Funds \$145,762.17

Retained Earnings \$56,166.32

Life Membership Funds \$5,851.06

Current Year Earnings -\$15,417.51

Historical Balancing \$6,789.86

Total Equity \$199,151.90



## New Zealand Esperanto Association

P.O. Box 8140  
Symonds Street  
Auckland 1035  
New Zealand

**[www.esperanto.org.nz](http://www.esperanto.org.nz)**  
[nzea@esperanto.org.nz](mailto:nzea@esperanto.org.nz)  
0800 350 781

Chris Krägeloh | President

Bradley McDonald | Vice-President

David Ryan | Treasurer

Howard Gravatt | Secretary

Erin McGifford | Committee Member

Rouan Van Ryn | Committee Member

Ivan Pivac | Committee Member

NZEA's vision is for everyone in New Zealand to recognise the value of Esperanto as an international language.

NZEA is one of the oldest Esperanto associations in the world, and is responsible for promoting Esperanto in New Zealand, providing learning material, and answering queries about the language.



## Australian Esperanto Association

Esperanto House  
143 Lawson Street  
Redfern NSW 2016  
Australia

**[www.esperanto.org.au](http://www.esperanto.org.au)**  
[info@esperanto.org.au](mailto:info@esperanto.org.au)  
+61 (07) 4696 9293

Sandor Horvath | President

Heather Heldzingen | Secretary

Indrani Beharry-Lall | Treasurer

Margaret Chaldecott | Director

Jonathan Cooper | Director

Kam Lee | Administrative Director

Esther Parris | Director

AEA was established for the promotion, education and use of the international language, Esperanto, in Australia.

AEA aims to make Esperanto available to help with intercultural understanding and harmony, and works to foster co-operation among Esperanto organisations with similar aims.



# venu al MELBURNO

por la 2015  
kongreso de esperanto  
kaj somerkursaro

Klasoj | Teatro | Muziko | Ekskursoj | Prelegoj  
kaj pli

vizitu [aea.esperanto.org.au](http://aea.esperanto.org.au) por pli da detaloj

2-11 Januaro 2015

